

2



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

FEBRUARO 1963

E N H A V O

	Paĝo
* * * Al 6000 membroj ĝis la Universala Kongreso	1
Elstara Esperanto-pioniro (pri la celebros de A. Grigorov)	2
Asen Grigorov. Versaĵoj	4
Ĥristo Manolov Esperanto en la lernejoj	6
* * * 48-a Universala Kongreso	7
Violin Oljarov. Lingvaj demandoj	8
Atanas D. Atanasov — A la Dektria leciono	10
Junularo sur posteno	11
ORGANIZA VIVO	14
* * * Edmond Privat	15
TRA LA GAZETARO	15

Abonkotizo: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B-162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



AL 6000 MEMBROJ ĜIS LA UNIVERSALA KONGRESO!

La lasta nia nacia kongreso en Burgas prenis la gravan decidon, ke la membroj de BEA atingu 6000. La lasta plenkunsido de CK de BEA decidis, ke ni plenumu tiun ĉi decidon ĝis la 48-a UK, kiu okazos en aŭgusto ĉi-jare en Sofio. La tasko estas tre serioza kaj malfacila. Ĝi ne plenumiĝus mem laŭ la natura fluo de la aferoj. Estas necesa modela organizo kaj laŭplana laboro por varbo de novaj membroj kaj por kolekto de la membro-kotizo de la malnovaj. Honore al la Universala Kongreso, kiu unuan fojon okazos en nia lando, ni strebu, ke eĉ unu esperantisto, kiu iam ajn lernis Esperanton, aŭ nun lernas ĝin, ne restu ekster niaj vicoj. La societaj estraroj devas en specialaj kunsidoj pridiskuti tiun ĉi plej gravan nun problemon, fari planon kaj krei organizon por ĝia plenumo. La delonge rekomendata sistemo de grupigo de la membroj devas fine esti aplikita. La kasistoj solaj ne povas kolekti la kotizon de ĉiuj membroj.

Tiurilate bone ekagis la sofia societo „M. Gorkij“. Tuj post la plenkunsido de CK de BEA la prezidanto de la societo starigis al la estraro la taskon plimulti la membraron kaj organizi la urĝan kolektadon de la kotizo. Oni dividis la membraron je grupoj. La estraro akceptis la gravan kaj laŭdindan decidon ĝis unua de majo enkasigi la kotizon almenaŭ de 600 membroj. Tiun ĉi decidon oni sciigis en ĝenerala kunveno. Dudek aktivuloj sin anoncis por helpantoj de la kasisto. Ili jam laŭplane vizitas la esperantistojn ĉu en ties loĝejoj, ĉu en oficejoj kaj fabrikoj kaj invitas ilin reguligisian membrecon. Rezulte en la kaso de „M. Gorkij“ jam troviĝas la kotizo de pli ol 150 membroj por la tuta 1963. Jen tiel ni devas agi — laŭplane, organizite kaj sindone.


Ĉiuj societoj devas sekvi la ekzemplon de la sofia societo „M. Gorkij“. La plenkunsido akceptis la planajn nombrojn de la distriktoj kaj de la plej grandaj societoj, kiuj estas publikigitaj en la unua kajero de BE. Oni pridiskutu kaj distribu ilin inter ĉiuj societoj. Pri tiu afero respondecas la membroj de CK en la distriktoj kaj la prezidantoj de la societoj. Laŭ la lokaj kondiĉoj oni devas strebi la superigon de tiuj ĉi nombroj. Societo „Marĉ“ en Stanke Dimitrov planis 120 membrojn. Ni esperas, ke ankaŭ aliaj societoj montros tian imitindan konkuremon.

Se ni bone organizas plenumon de tiu ĉi grava tasko kaj laborus kun la specifa por la esperantistoj veruo kaj sindono, ni renkontos fieraj kaj ĝojaj tiun grandan feston, kia estos la 48-a Universala Kongreso. La tempo marŝas rapide. Ni ne perdu la tagojn!

ELSTARA ESPERANTO-PIONIRO

Je la 28-a de januaro kuranta jaro CK de BEA kaj sofia Esperanto-societo „M. Gorkij“ celebris 60-an datrevenon de la malnova esperanta pioniro Asen Grigorov kaj lian 40-jaran esperantan agadon.

Estas 18.30 vespere. La scenejo de la klubejo estas neordinare ornamita. Sur la feste kovrita tablo staras vazoj kun ruĝaj floroj. En la fundo de la scenejo — standardoj, ruĝaj, verdaj kaj trikoloraj.



En la difinita tempo la seĝoj estas okupitaj. Neniam la salono entenis tiom da ĉeestantoj. Multaj el ili estas malnovaj esperantistoj-pioniroj, amikoj, konatuloj kaj ŝatantoj de la jubileulo. Estas ankaŭ multaj junuloj. Iuj inter la ĉeestantoj estis lernantoj de k-do Asen Grigorov. Multaj el ili spertis lian helpemon, lian patrecan zorgon por eduko de Esperanto-aktivuloj.

La prezidanto de la sofia Espanto-societo „M. Gorkij“ N. Nanov per kelkaj vortoj malfermis la kunvenon. Estis elektita prezidantaro de malnovaj esperantistoj, kunagantoj de la jubileulo. La viceprezidanto de BEA At. Lakov raportis pri la esperantista, socia, kultura kaj verkista agado de k-do Grigorov.

Post la fino de la ĉefa raporto la prezidanto de BEA k-do Hr. Gorov tra legis gratuladreson de CK de BEA al la jubileanto kaj transdonis al li belan donacon.

Post mallonga momento eksonas fanfaroj en la salono. Plena silento kvazaŭ neniŭ en la salono spiras. Sur la scenejo aperas tri ĝeneralantoj-junpioniroj.

— Kamarado prezidanto de la kunveno, permesu, ke grupo da pioniroj gratulu la jubileanton — diras la pioniro.

La prezidanto permesas.

La gratulon de la pioniroj sekvas amasaj aplaŭdoj.

Grigorov ricevas gratulojn kaj donacojn en la nomo de la societo „M. Gorkij“, de la poŝtista societo „Heroldo“, de la fervojista societo „Prospero“ kaj de apartaj amikoj kaj kunbatalantoj. Li kortuŝite respondas per kelkaj dankvortoj.

— Mi, gekamaradoj, — diris li — konsideras tiun solenaĵon kiel estimon al la multaj esperantistoj pioniroj, al la Esperanta movado, al Esperanto mem.

Estis prezentita arta programo kun verkoj ankaŭ de la jubileanto, plenumitaj de la Esperanto-teatro.

Tiu ĉi jubilea festo al nia kara longjara Esperanto-pioniro A. Grigorov vekas grandan intereson ne nur inter sofiaj esperantistoj, sed ankaŭ inter la esperantistoj en la tuta lando. Ĝi estas bela ekzemplo kaj instigo por la junaj esperantistoj, por la sukceso de la Esperanto-movado kaj Esperanto kiel rimedo por interpopola kompreniĝo, por paco inter la popoloj.

Ni ankoraŭfoje gratulas al nia k-do Grigorov kaj deziras al li multjaran vivon por la sukceso kaj la bono de nia afero.

Nano Nanov

ALTA DISTINGIGO

Okaze de la 60-jara aĝo kaj lia aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj la kapitalismo kaj en la kontrolo de la socialismo, en la kultura kaj la socia vivo de la lando la PREZIDANTARO DE LA PARLAMENTO dekoraciis k-don ASEN GRIGOROV, membro de CK de BEA per la alta ordeno „9-a de Septembro 1944“ unua grado.

Ni tute gratulas!

Al k-do Asen Grigorov
bulv. Tolbuhin № 10
SOFIO

Karega kamarado Grigorov,

Ni sendas al vi niajn plej varmajn gratulojn pro via rimarkinda jubileo de 60-jara aĝo kaj 40-jara motela agado en la Esperanto-movado kaj niajn sincerajn bondezirojn pri sano, longa kaj feliĉa vivo kaj daŭra fruktodona laboro por nia kara movado.

Ja vi dediĉis vian tutan konscian vivon al la homara idealo pri paco kaj interpopola fratigo, pro kio vi ekportis ekde frua aĝo la verdan torĉon kaj 40 jarojn jam vi ne ellasis ĝin eĉ por momento, malgraŭ la ŝtormoj de la faŝista obskureco.

Jam 19-jara junulo vi aliĝis al la Esperanto-movado en 1922 Dum longaj jaroj vi estis unu el la gvidantoj de nia movado — redaktoro de „Bulgara Esperantisto“, kunlaboranto de „Balkana Laboristo“, „Internacia Lingvo“, redaktoro de „Internacia Laborist-Kampana Korespondanto“, de la ŝatata revuo „Internacia Kulturo“, de la riĉenhava kaj abunde ilustrita revuo „Nuntempa Bulgario“, sekretario de la Asocio, membro de ĝia Estraro, aŭtoro de vervaj versaĵoj kaj rakontoj, talenta tradukanto kaj redaktanto, aŭtoro de lernolibro kaj vortaroj, sperta propagandanto kaj organizanto de la movado Vi kunlaboris al diversaj esperantaj eldonaĵoj, gvidis multajn kursojn — ĉu por vidantaj homoj, ĉu por blinduloj, ĉiam sperte kaj sukcesplene. Vi propagandis senĉese kaj senlace kaj varbis ne centojn, sed milojn da adeptoj de la Zamenhofa lingvo. Ne hazarde vi gajnis la honorplenan nomon „Esperantista Pioniro“. Oni neniam forgesos viajn poemarojn „Garbo“, „Ruĝa aŭroro“, vian perfektan redaktan laboron de la fama romano de Georgi Karaslavov „Bofilino“, de „Bulgara prozo“, de la multnombraj libroj kaj broŝuroj, eldonitaj de Fremdlingva Eldonejo.

Vi havas la plenan rajton nun ĝui la abundajn fruktojn de viaj multjaraj klopodoj.

Fartu bone, karega kaj atestimata k-do Grigorov, kaj daŭre portu alte la verdan torĉon de la Esperanto-movado!

Sofio
la 28-an de januaro 1963

Estraro de la Centra Komitato
de Bulgara Esperantista Asocio

Ĉu vi pagis vian membro-kotizon? La limdato por elsuldiĝo de la kotizo al la asocio por la unua monatario estas la 10-a de marto. Sed ĝis nun tre malmultaj societoj faris tion. Gekamaradoj, ne rompu la asocian disciplinon.

PRINTEMPA KANTO

Mia kanto trumpetis alarme printempan informon.
Ĝi heroldas tra tuta la mondo tagigon en flam'!
Kaj kun fajra ekstremo vekigas la mondo el dormo,
ĝojkriante la fajroliterojn kun kora akklam'.

Mia kanto bruligas la korojn per vorto de fajro,
ke kunkantas samsono en unu potenca akord'
la korbato de l' tuta homaro — kaj fajrofanfaroj
batalprete kaj ĝoje reeĥas de bordo al bord'.

Estas for la malvarma glacio, la nira obskuro.
La polusoj genuas kaj aŭdas kun timo en kor' —
ke tra tuta la tero galopas kun fulma trakuro
la amasoj milmilaj kun flagoj je ruĝa kolor'.

La vilaĝoj, la urboj, la kampoj, la montoj kaj maroj
vivu-krias en unu giganta kaj festa parad':
ja alvenis la flora printempo en ruĝa flamaro,
jam la sun' estas nia, kaj nia — la ter', kamarad'!

Mia kanto trumpetis alarme printempan informon.
Ĝi heroldas tra tuta la mondo tagigon en flam'!
Kaj kun fajra ekstremo vekigas la mondo el dormo,
ĝojkriante la fajroliterojn kun kora akklam'.

Ĥristo Smirneniski

TRA LA VENTEGO

Ĝisvivos mi la feston de la fratoj
kaj ties svingon de flugil'
kiam sur fruntoj mil kaj mil
mortsignon markos la kruela fato
kaj kiam tondre vokos la tempest'
idaron sian al ribelprotest'.

Tra la krepusk' de pezaj zorgoj kaj malĝojo,
tra la eterna bruoj de l' labor'
ekbrilos stelo de aŭror',
sur la Spartaka kruta, sankta vojo
alkuros are el kaban' kaj dom'
luktantoj nekonataj kaj sen nom'.

Mi vidos nekonataj, grandaj
la mil amasojn, kiuj ĝemis ĵus,
ĉe kies pord', insidas la enu',
kaj ĉiam estas zorgoj embuskantaj
kaj kies vitrojn disrompitajn Mort' —
glacia Mort' albatas kun horor'.

Mi vidos la majestatan ŝturmon de la sklavo,
mi aŭdos tondron skui kun aŭdac'
la dormon pacan de la plac'
kaj portos ruĝan profetaĵon ravan
al la premita homa gent'
rompinta jugon de jarcent'.

Kaj pala kaj silenta kun la palaj fratoj
ekiros mi kun mia nigra kruc'
kaj sanga fingro marku sur la brust'
la lastan tagon de la batalado
kaj kajno rompu per kartoĉa fer'
la fruntojn kaj la revon miajn sur la ter'.

Kaj vi, kamaradino kara, konsolanta,
vi iru plu kuraĝe, kun jubil'
de la printempo al la sunobril'.
Kaj per koralaj gutoj de purpura sango
mi kisos vin je via hela vest'
kaj la matenon de l' unua nia fest'.

Tradukis: Asen Grigorov

LETEROJ

KNABA

Kiel vi aspektas, mia kara, malproksima Kárin?
Mi ne scias — kaj mi tamen vidas en imago vin.
Kvankam tiel zorge volis skribi vi, por trompi min,
scias mi, ke vi apenaŭ havas deksep junajn jarojn.

Pri la svedoj lastatempe legis tiel multe mi,
kaj mi scias, ke vi estas strange milda, mia Kárin.
La okuloj — mare bluaj, oreblondaj — viaj haroj,
kaj la manoj — neĝeblankaj kiel floro de lili'.

Volus droni mi en vian belan, helan okulparon,
kiu brilas kun la brilo de la maro dum maten'
ke mi trovu mian hejmon, ke min blovu la seren'
de rigardo via blua kaj de viaj deksep jaroj,
ke min premu viaj manoj, kara, malproksima Kárin
kun kareso varme—mola, kun fandanta ĉirkaŭpren'.

KNABINA

Hideo, mian korbataĉon vi devis aŭdi ĉi-vespere
ĉe la rivero de l' letero, de la konata kara skribo.
Ho, kiel ruĝis mia vango, kaj kiel tremis mia lipo
legan e vian mildan vorton, kiun vi flustris perletere.

Mi ankaŭ vidas vin image: vi sidas ĉe la bordo mara,
rigardas en la malproksimon, kiu perdiĝas for nebule.
Kaj tiam venas la vespero tiel silente, tiel lule
rebrilas en rigardo via kaj dronas en la sin' akvara.

Mi tiam eta japanino dezirus esti, O Hideo,
rigardi vin migdalokule en la krepusko de l' vespero
kaj senti la varmecon molan de vi kaj de l' japana tero.

Ĉu vi ne aŭdas korobaton, ĉu vin ne tuŝas milda veo?
Ĝi estas mia korobato kaj mia veo, o Hideo,
kaj eble unu juna amo, kaj eble unu malespero.

AL MIA KRAJONO

Dezirus mi priskribi la turmenton
de la proleta klaso subpremata —
ĝi kiel vivas pala, sentegmenta,
kaj kiel mortas ĝi — senĝoja kaj malsata.

Rakonti pri l' teruro, pri l' senfunda
mizero de l' malriĉa radkvartalo.
Per fingro tuŝi la sangantan vundon
el kiu lekas sangon — Kapitalo.

Rakonti pri l' turmento de l' infanoj
de l' laboristoj, kiuj ĉion kreas,
sed mem nenion havas en la manoj,
sed mem obeas, veas kaj — pereas.

Sed ne! ne tion volas mi rakonti.
Mi aŭdas la murmuron malproksiman
de la proletaj ondoj ribelontaj,
la ŝturmon de l' proleta mar' senlima.

Krajono mia, skribu vi admire
pri l' fajro, kiu brulas sub la tero,

pri la batal' en kiu mortas vire
proletoj — ne! profetoj de l' libero!

Protestu arde kontraŭ la maljusto
kaj kune kun la bravaj samcelanoj
potence krii mi el tuta brusto:
sufiĉe furiozis vi, tiranoj!

Sufiĉe suĉis vi el nia karno!
Sufiĉe nin mortigis sen kompato!
Sufiĉe fluis nia sango varma —
sufiĉe daŭris nia suferado!

Alvenis fine la decida horo.
Ni vian jugon plue ne toleros?
Sur la ĉiel' purpuras la aŭroro —
heroldo fajreruga de l' libero.

Krajono mia, vi pri ĝi rakontu —
prikantu vi la venkon de l' proleto,
kaj ĉe la sojlo de la tag' estonta
rompiĝu tiam, mia krajoneto!

ЕСПЕРАНТО В УЧИЛИЩАТА

Възможно ли е да се преподава есперанто в училищата ни въз основа на съществуващите правилници? Практиката вече доказва, че това може да става, стига да има повече инициативност и повече упоритост от страна на нашите активисти. В Правилника за общообразователните училища, § 93, се говори за предметни, технически, природолюбителски и др. кръжоци, без да се упоменава какви точно могат да бъдат. Това не е нито възможно, нито потребно, защото съобразно интересите на учениците може да съществуват най-различни кръжоци. Следва, че към кръжоците могат да се причислят и есперантските кръжоци. За тяхната необходимост можем да се позовем на §§ 1 и 47 от цитирания Правилник, където се отделя важно място на интернационалното възпитание — област, в която есперанто може да играе огромна роля.

В началото на учебната година, по предложение на директора и на отделни учители, в учителския съвет се решава въпросът за броя на ученическите кръжоци и за техните ръководители. В списъка с изчисления размер на заплатите на учителите, който се изпраща за одобрение в Отдел „Просвета и култура“, директорът вписва и кръжочната заетост на учителите. За ръководство на кръжоците се предвижда възнаграждение, показано в нарочната инструкция за заплатите на учителския персонал. В някои отдели се иска и отделен списък на проектираните кръжоци — за одобрение.

Веднъж одобрен списъкът за заплатите и за кръжоците, той става закон. В поменатата инструкция също не се прави никакво ограничение какви кръжоци могат да се организират и какви не могат. Следователно, и тук есперанто може да намери своето място редом с литературните, историческите и други кръжоци в училището. Важното е в учителския съвет да се поеме инициативата за организирането на такъв кръжок и директорът да го предвиди в предложенията си за Отдела. Лицата, които не са учители, получават лекторско възнаграждение по реда, определен в Инструкцията за заплатите. Веднъж включено в редицата на съществуващите в училището кръжоци, изучаването на международния език ще трябва да намери и точното си място в седмичното разписание за извънкласната работа, което се изготвя обикновено от директорите или от зам. директорите.

По този начин работят есперантските кръжоци в Търновски окръг от 1959 г. насам, като напълно нормално явление, официално признато от ръководните органи. В момента в Средното политехническо училище „Девети септември“, находящо се в с. Полски Тръмбеш, работят есперантски кръжоци поотделно за VI, VII, VIII, IX, X и XI класове. На учителите-ръководители на кръжоци по есперанто се заплаща предвиденото за всички други кръжоци възнаграждение. Разбира се, въпросът не е толкова до самото възнаграждение, а до официалното признаване на есперантските кръжоци като част от голямото дело за комунистическото възпитание на учащите се. Някои от нашите кръжък-ръководители водят кръжоците по есперанто безплатно.

Директори на училища, а и някои началници на отдели, за да прикрият отрицателното си отношение към есперанто, искат в правилниците и наредбите да било непременно упоменато името на есперанто, да бъде то официално признато и препоръчано „от горе“. Може би и в тази насока следва да се направят съответни постъпки пред МПК, за да изчезне всяко съмнение в полезната и прогресивна роля на международния език.

Хр. Манолов, директор на СПУ
с. Полски Тръмбеш, Търновско

48-a UNIVERSALA KONGRESO

LA PEDAGOGIA ĈE-SEMINARIO



SOFIO 3-10 VIII 1963

Aligintoj ĝis 11. 2. 1963: Arabio 1, Argentino 2, Aŭstralio 2, Aŭstrio 16, Belgio 32, Brazilo 2, Britio 66, Bulgario 543, Ĉeĥoslovakio 2, Danlando 38, Finnlando 35, Francio 188, Germanio (okc.) 72, Germanio (or.) 15, Hispanio 6, Hungario 63, Islando 2, Israelo 1, Italio 93, Japanio 5, Jugoslavio 21, Kanado 2, Madagaskaro 1, Meksikio 4, Monako 3, Nederlando 89, Nigerio 2, Norvegio 8, Nov-Zelando 3, Pollando 268, Rumanio 1, Sovetunio 38, Svedio 81, Svisio 7, Usono 5, Vietnamo 1. Entute 1718 el 36 landoj (pasintjare 742 el 32 landoj).

En la kadro de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto okazos la jam tradicia Ĉe-Seminario por Esperanto-instruistoj.

La seminario estas destinita al tiuj, kiuj jam konas la lingvon kaj mem intencas instrui ĝin laŭ tiu ĉi metodo.

La lecionoj de la seminario okazos dum 15 horoj en kvin tagoj, dum la kongresa semajno, tiel ke ne estos samtempaj kun la ĉefaj aranĝoj, por ke la seminarianoj povu ĉeesti ĉiun gravajn kunvenojn, festojn, k. t. p.

La kotizo de la seminario estas 12 ned. gld., sendendaj samtempe kun la aligilo al la konstanta adreso de la kongreso, aŭ al la kongresaj perantoj.

Nur bulgaroj sendu la aligilon al: 48-a Universala Kongreso de Esperanto, P. K. 44, Sofio, kaj la kotizon de 3,90 al la konto de la 48-a UK ĉe Bulgara Nacia Banko, Sofio, Konto № 105Ĉ/2993.

Por la bona aranĝo de la seminario bonvolu sendi vian aligilon kiel eble plej baldaŭ.

Pliaj informoj aperos en la venontaj Oficialaj Komunikoj kaj en la Dua Bulteno. La horaro de la seminario troviĝos en la Kongresa libro.

Aligiloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la kongreso.

ESPERANTO -KINOKLUBO

La klubo organize stabiligis. La sekcioj foto, kino kaj magnetofono laboras aktive. Jam estas preta la 16 m/m filmo „Bonan venon en Sofio“. La organiza komitato de la 48-a U K mendis tri kopiojn de la filmo, kiujn oni sendis por projekciado en eksterlando. La preparlaboroj por filmigo de la kongresoj en Vraca kaj Sofio komencigis. La magnetofona sekcio surbendigis kelkajn Esperanto-programojn kaj kolektis dekon da gramofondiskoj. Ili estas je dispono de la societaj estraroj por utiligado kontraŭ pago de la faritaj elspezoj por ties pretigo kaj sendo.

La foto-sekcio komencis liveri al la Esperanto-gazetoj fotojn. Ĝi respondecas pri la starigo de la foto-ekspozicio — konkurso dum la 48-a U K.

La agado de la klubo estas granda kaj multflanka, kaj oni ne povas ĉion respeguli en kelkaj linioj.

Nik. Nikolov

1. LA KOMPLEMENTOJ DE LA IG-VERBOJ

Другарят Ат. Крумов от Пловдив ни задава следния въпрос:

За мен до сега е било като азбучна истина, че глаголи (преходни), образувани с наставка **ig** винаги изискват пряко допълнение (допълнение във винителен падеж). Преди известно време срещнах в един от броевете на „El Popola Ĉinio“, допълнение на глагол с наставка **ig**, употребено с предлог. Не обърнах внимание; помислих, че е случайна грешка. Но в „Sub la jugo“ срещнах отново подобно нещо, което ме и накара да се обърна към вас. На стр. 49 ред 13 отдолу имаме следната фраза: „*La kafejestro . . . rapidis sciigi al li la aventuron de la doktoro en strato Petkanĉoviĉa.*“ На стр. 69 ред 22 отгоре със същия глагол е формиран следният израз: *Mi devas interparoli kun li . . . ĉu vi permesas al mi sciigi nur al li vian konfidencon.* На стр. 168 р. 26 от горе имаме следната фраза: „*Tamen la kampogardisto Mial rimarkigis al la popo, ke ne tuta homo, sed eĉ kokido ne estus povinta kaŝi sin inter tiaj objektoj.*“

Не би ли било правилно при първата фраза преводът да бъде: „*La kafejestro rapidis sciigi lin pri aventuro . . .*“? Не би ли било правилно във втория израз преводът да бъде: „*Ĉu vi permesas al mi sciigi nur lin pri via konfidenco*“? Не би ли било правилно в третия случай преводът да бъде: „*Mial rimarkigis la popon, ke ne . . .*“? Ако във фразите, които цитирах от „*Sub la jugo*“ няма грешка, поставям въпроса: може ли при глаголи с наставка **ig** да се заменя винителният падеж с предлог (вм. *rekta komplemento* да се употреби *nerekta komplemento*)?

Отговор

В есперанто съществува особена форма на действителния залог, която изразява, че действието се налага от подлога на някого, който го изпълнява под негово въздействие. Тая форма се образува с наставката **ig**, поставена към корена на действителния залог. В тия случаи наставката **ig** означава, че подлогът кара някого или става причина някой да направи това, което изразява коренът на глагола, или довежда нещо или някого в състояние, изразено в корена. Това може да стане със задължаване, принуждаване, молба, психическо въздействие и т. н. В тая форма непреходните глаголи стават переходни, а переходните обикновено изискват две допълнения: едно — на причиняващото действие, и друго — на причиненото действие. При това едното обикновено е пряко допълнение, а другото — непряко.

Примери:

Mi sidigis lin — аз го накарах (сложих) да седне. *La patrino dormigis la infanon* — Майката приспа (накара го да спи) детето. *Oni promenigis la gastojn tra la urbo* — Разходиха гостите из града. *Mi tondigos mian hararon* — аз ще острижа косата си (не собственоръчно, а чрез бръснаря, ще го накарам да я остриже). *La redaktoro presigis kritikan artikolon* — Редакторът напечата критическа статия (не собственоръчно, а чрез печатаря). *Oni sciigis al ni agrablajn novaĵojn* — Съобщиха ни (накараха ни да знаем) приятна новина.

Няма правило, което да определя, кое допълнение трябва да бъде пряко (акузатив) и кое непряко (с предлог). Глаголите със суфикса **ig**, образувани от глаголни корени, обикновено означават: *fari (igi) iun (aŭ ion) -anta, aŭ -ata*. В горния случай: „*Sciigi nur al li vian konfidencon*“ оз-

начава igi vian konfidencan sciata. Но същата фраза може да означава: igi lin scianta vian konfidencan. За това фразата може да приеме и такъв вид: Sciigi lin pri via konfidenco. Същото може да се приложи и към другите примери. Смеслова разлика между двете форми няма. Може да се избере едната или другата.

2. PRI LA MODO KUN LA KONJUNKCIO „KVAZAŬ“

Другарят Ат. Крумов задава и следния въпрос:

До сега никога в разговорите, които съм водел с есперантисти, не съм забелязвал да се употребява съюза **kvazaŭ** с глагол, поставен в условно наклонение. В „Sub la jugo“ на стр. 114 р. 23 отгоре имаме следната фраза: „*La tuta teatro mutiĝis, kvazaŭ en ĝi estus nenia vivanta animo*“. Подобно нещо срещаме и на стр. 116 р. 9, където изразът е даден, както следва: „*Kvazaŭ li estus frato de princo Kuza*“. Поставяме въпроса: може ли в горните фрази вместо **estus** да се употреби **estas** или **estis**? Не получава ли изразът някакъв по-друг смисъл? И как би следвало да се превежда, ако действително фразата придобива по-друг смисъл?

Отговор

Условното наклонение изразява, че даденото действие би се извършило при определено условие, ако се осъществеше или би било на лице някакво друго действие или състояние, означава евентуалност, нереалност на действието. Точно това изразява съюзът **kvazaŭ**: сравнение с известна доза на предположение, съмнение или приблизителност на сравнението. Ние бихме могли да го заменим с **kiel se**. Ето защо е правилно глаголът да се употреби в условно наклонение. Първият пример ще се преведе така: „*Целият театър онемя, като че ли в него нямаше никаква жива душа*“ (но фактически в него имаше „живи души“). Вторият пример: „*Като че е брат на принц Куза*“ (но фактически не е). Заменхоф и други автори употребяват и изявително наклонение в тези случаи, т. е. в горните примери **estis** или **estas**. Това не изменя смисъла на изречението, следователно и превода му. Изявителното наклонение е оправдано, ако с **kvazaŭ** искаме да изразим не приблизително сравнение, наподобяване на друго действие или състояние, което фактически не съществува, а **вероятност**, както е в следното изречение на Заменхоф: „*Li vokas vin, kvazaŭ li volas ion komuniki nur al vi sola*“. Тук имаме не сравнение — наподобяване, както в първите примери, а силно съмнение, вероятност, че това ще да е така. И в този случай преводът на български си остава същият. Може някъде оттенък да се изрази с интонацията. В повечето случаи обаче правилно и логично е с **kvazaŭ** да се употребява условно наклонение.

Виолин Олянов

— TIEL ANKAŬ VI AGU! —

La sofia esperantista societo „M. Corkij“ decidis kolekti kaj pagi al CK de BEA ĝis la unua de majo la membro-kotizon de almenaŭ 600 membroj. Helpe al la kasisto enkasigas la kotizon 20 aktivuloj. Jam estas kolektita la kotizo de pli ol 150 membroj. Gratulon!

KION NI VIDIS TRA LA FENESTRO DE LA DRINKEJO

Dektria leciono

— Proksimiĝu tien ĉi, amiko. Rigardu tra tiu ĉi fenestro en la drinkejon. Ĉu vi konas tiun junulon?

— Sed tio ja estas nia kamarado Aleksandro!

— Ĝuste li estas. Kaj ĉu vi vidas en kia stato li estas?

— Antaŭ li sur la tablo estas glaso plena je vino. Certe li intencas trinki ĝin.

— Jes. Efektive Aleksandro estas trinkonta la vinon. La vino estas trinkota de Aleksandro.

Jen nun Aleksandro estas trinkanta la vinon. La vino estas trinkata de li. Jam Aleksandro estas trinkinta la vinon. La vino estas trinkita de li.

Kaj nun, amiko, mi povas diri al vi, ke mi hieraŭ observis tra la sama fenestro kaj vidis la saman aferon: Aleksandro sidis ĉe la tablo kaj sur la tablo estis glaso da vino.

Unue: Aleksandro estis trinkonta la vinon.

La vino estis trinkota de li.

Poste: Aleksandro estis trinkanta la vinon.

La vino estis trinkata de li.

Fine: Aleksandro estis trinkinta la vinon.

La vino estis trinkita de li.

Se morgaŭ ni rigardos en la drinkejon, eble ni vidos Aleksandron en la sama stato:

Unue li estos trinkonta la vinon kaj la vino estos trinkota de li.

Poste li estos trinkanta la vinon kaj la vino estos trinkata de li.

Fine li estos trinkinta la vinon kaj la vino estos trinkita de li.

PARTICIPOJ (en adjektiva formo)

-anta = kiu -as: leganta knabo = knabo kiu legas.

-inta = kiu -is: leginta knabo = knabo kiu legis.

-onta = kiu -os: legonta knabo = knabo kiu legos.

-ata = kiun oni -as: legata libro = libro kiun oni legas.

-ita = kiun oni -is (kiun oni jam -is): legita libro = libro kiun oni (jam) legis.

-ota = kiun oni -os: legota libro = libro kiun oni legos.

Mi skribas leteron. Mi estas skribanta, la letero estas skribata de mi.

Mi skribos la leteron. Mi estas skribonta (mi preparas min por skribi). La letero estas skribota de mi (aŭ estos skribata de mi).

Kiam li eniris la ĉambron, mi estis skribanta la leteron (mi skribis la leteron en tiu tempo mem).

Kiam li eniris la ĉambron, mi estis skribinta la leteron (mi finis la skribadon de la letero antaŭ lia eniro, li trovis min ĉe finita ago).

Kiam li eniris la ĉambron, mi estis skribonta la leteron (mi prepariĝis por skribi ĝin, mi intencis komenci ĝian skribadon).

Ŝi estas amata de ĉiuj = ĉiuj amas ŝin.

Se vi pasos tra tiu loko, vi estos vidata de ĉiu flanko (de ĉiu flanko oni vidos vin).

Li estis estimata de ĉiuj (ĉiuj estimis lin).

Noto. — 1. Oni ne lasu sin influi de la uzado de la participoj en sia nacia lingvo, kiu ofte ne estas plene sama al la uzado en Esperanto. Tio validas pleje por illa uzo en la formado de verbotempoj. Lernu la logikan sencon de la esperantaj participoj!

2. Speciale atentu pri la uzo de la participoj **-ata** kaj **-ita**: **-ata** esprimas faron de ago en ĝia daŭreco de plenumoj **-ita** — kompletan, definitivan plenumigon de la ago. Ekz.: La kongreso **estis fermita** la 10 an de aŭgusto je la 12-a horo (en tiu horo ekestis la stato de **fermiteco** de la kongreso — en ĝi oni fermis la kongreson). Tiel ni diros, se ni deziras nur sciigi la simplan fakton de la fermo. Tamen se ni apudmetos du faktojn (okazojn), tiam en konsidero al ilia samtempeco aŭ nesamtempeco ni povas havi du esprimojn: a) Kiam mi eniris la salonon, la kongreso **estis fermata** (ĝuste en tiu momento oni efektivigis la ceremonion de fermo) — samtempeco: eniro en la salonon kaj ferma ceremonio. b) Kiam mi eniris la salonon, la kongreso **estis** (jam) **fermita** (mi ne trafis la ferman ceremonion, ĝi okazis antaŭ mia eniro) — el la du faktoj — eniro kaj fermo — la dua okazis antaŭ la unua.

3. Per la participoj oni povas esprimi en Esperanto, **kiam necese**, la nuancojn de la diversaj pasintaj verbotempoj (imperfekto: mi **estis**-anta, pluskvamperfekto: mi **estis**-inta ktp.).

4. Kelkaj nespertaj esperantistoj erare metas iufoje la subjekton de pasiva verbo en akuzativan formon aŭ eĉ la particon mem: La libron estas legita de li, aŭ: estas legitan de li. La libron legatan estas interesa. — Tio estas ŝuldata al erara kompreno pri la rilato inter aganto kaj objekto de la ago ĉe aktivaj verboj. Estas necese klarigi al tiaj esperantistoj la esencan diferencon inter la esprimoj:

La knabo legas la librón (kiu kion legas — ni parolas pri la ago de la knabo).

La libro estas legata de la knabo (kió estas legata — ni parolas pri la stato, la esto de la libro, kiun la knabo legas).

EKZERCOJ

1. Kiu preparas sin por dormo estas... Kiu nun dormas estas... Kiu jam dormis estas...

La lundo, kiu venos, estas la ven... lundo.

La merkredo, kiu pasis, estas la pas... merkredo.

Mi veturis al Francio dum la pas... jaro (la jaro, kiu pasis).

Ni revidos nin dum la ven... semajno (la semajno, kiu venos).

2. Metu tien ĉi la leg... librojn (la librojn, kiujn ni legis) kaj tien la leg... (kiujn ni legos).

Ne b daŭru pro la perd... mono (pro la mono, kiun vi perdis).

JUNULARO SUR POSTENO

IV-a TUTLANDA ESPERANTISTA JUNULARA BALO-FESTIVALO

VARNA, 11 — 12. V. 1963

Provizora programo

sabato 11. V — 20 h. Junulara balo

Restoracio „Ĉernomorec“ en la somerrestadejo „Družba“

dimanĉo 12. V — 8 h. Koncerto — festivalo de la junularaj artgrupoj.

Granda salono de la kulturdomo de la ŝipkonstruistoj.

10 h. Oratora konkurso

Ejo en la kulturdomo de la ŝipkonstruistoj.

Aliĝo. La aliĝo efektiviĝos nur pere de la junularaj grupoj kaj lokaj Esperanto-societoj. Nomarojn (nomoj kaj adresoj) sendu al: **VARNA, p. k. 11, Organiza Komitato de la IV-a Balo-Festivalo.** Limaĝo: 30-jaroj. Limtempo por aliĝo: 20. IV. 1963.

Kotizo. La kotizo estas 2 lv (por lernantoj — 1,50 lv.) kaj inkluzivas ĉiujn arandojn de la balo-festivalo kaj la tranoktadon sabate vespere en hotelo aŭ privata domo en la centro de la urbo. Kotizojn sendu per poŝtmandato al la supreindikita adreso. Aliĝoj sen samtempa transpago de la kotizo ne estas traktataj.

Festivalo. La junularaj artgrupoj kaj apartaj junaj geaktoroj kiuj intencas partopreni la festivalon devas anonci sin sendante apartan nomaron de la partoprenantoj en la artgrupo, nomo kaj adreso de la gvidanto kaj kiom eble pli kompletajn informojn pri la prezentota programo. Prefere oni elektu bulgarajn kantojn kaj verkojn de bulgaraj aŭtoroj.

Kompetenta juĝkomisiono prijuĝos la prezentitajn programerojn. La Organiza Komitato disdonos al la gajnintoj (junularaj grupoj kaj apartaj junuloj) valorajn premiojn, kristalan pokalon kaj diplomojn.

Oratora konkurso. En la oratora konkurso rajtas partopreni ĉiu junulo ĝis 28-juraĝa, kiu parolos pri unu el la temoj:

1) Kiel reciproka aprecio de kulturoj povas helpi al interkompreniĝo inter la popoloj?

2) Kio estu la enhavo de la kultura agado de la junularo?

3) Kiel mi konceptas la mondon en 2000 jaro.

4) Kiel arto povas kontribui al paco?

5) Ĉu Esperanto estas por mi vera funkcia rimedo por internaciaj kontaktoj?

6) Kion fari por ne vane ellerni Esperanton?

Oni disdonos tri ĉefajn premiojn kaj plurajn aliajn.

La Festivalo en Varna estos bona antaŭpreparo por la kulturaj programoj en Vraca kaj Sofio.

PLANO

pri la agado de BULGARA ESPERANTO-JUNULARO dum 1963

ĜENERALAJ TASKOJ

A. de la Estraro de BEJ

1. Fondi novajn Junularajn Grupojn, konforme al la decidoj de la plenkunsido de CK de BEA.

2. Efektivigi konstantajn kontaktojn kun la JG per cirkuleroj, la junulara pago en „Bulgara Esperantisto“ kaj vizitado de lokaj grupoj.

3. Plibonigi la redaktadon de la junulara pago en „Bulgara Esperantisto“, kiel efektiva organo de BEJ.

4. Efektivigi kontaktojn kaj interŝanĝon de sperto kun la aliaj landaj sekcioj de TEJO.

5. Organizi la IV-an Tutlandan Esperantistan Junularan Balon-Festivalon en Varna

B. de la lokaj Junularaj Grupoj

1. Varbi novajn membrojn kaj zorgi pri la plialtigo de la lingva nivelo de sia tuta membraro, organizante kursojn kaj kunvenojn.

2. Efektivigi intimajn kontaktojn kun la lokaj organizaĵoj de DKMS.

TASKOJ LIGE KUN LA JUNULARA JARO KAJ LA 19-A KONGRESO DE T. E. J. O.

A. de la Estraro de BEJ

1. Organizi la partoprenon de la bulgaraj gejunuloj en la 19-a Kongreso de TEJO kaj la 48-a UK de Esperanto.

2. Organizi informadon pri la internaciaj Esperanto-kongresoj per la centra gazetaro kaj radio.

resp: la sekretario
resp: la estraro pri informado

3. Eldoni porjunulan propagandan flugfolion.

resp: la estrarano pri
informado.

4. Kunvoki en Vraca la estraron de BEJ 2 tagojn kaj ĉiujn bulgarajn gepartoprenantojn — minimume 1 tagon antaŭ la kongreso por plenumo de lastmomentaj taskoj.

5. Organizi landan oratoran konkurson por elekti la partoprenantojn en la oratoraj konkursoj en Vraca kaj Sofio.

resp: la sekretario

B de lokaj junularaj grupoj

1. Arangi solenajn kunvenojn okaze de la Junulara Jaro kaj la 19-a Kongreso de TEJO.

2. Aligi siajn delegitojn en la 19-a Kongreso de TEJO, konforme al la instrukcioj de la Kongresa Komitato.

3. Instigi junajn aktivulojn al partopreno en la 48-a UK de Esperanto en Sofio.

4. Organizi viglan informadon pri Esperanto kaj speciale pri la internaciaj Esperanto-kongresoj per la loka gazetaro, la loka radio-servo, per vitrinoj, ekspozicioj ktp.

5. Prepari konvenajn programerojn, prezenteblajn dum la 19-a Kongreso de TEJO en Vraca kaj eventuale dum la 48-a UK en Sofio kaj partopreni la IV-an Tutlandan Esperantistan Junularan Balon-Festivalon en Varna.

6. Prepari kapablajn konkursojn en la landa orato a konkurso kaj poste eventuale en la oratoraj konkursoj en Vraca kaj Sofio.

La plano estis akceptita en la kunsido de la estraro de BEJ, la 15-an de decembro 1962 en Sofio.

LA KONGRESA KOMITATO INFORMAS

Sekvante la ekzemplon de aliaj kongresoj, la Kongresa Komitato decidis premiigi ĉiun kvindekan aliĝinton per speciala donaco.

Bulgara Esperanto-Kinoklubo intencas filmigi la kongreson en Vraca, ĝiajn plej gravajn erojn, samkiel la ĉiutagan vivon de la kongresanoj.

La KK decidis arangi grandan lotieron. Tiucele ĉiu kongresano devas donaci objekton, prefere tipa por lia (ŝia) loĝloko. Ĉiu objekto nepre devas porti klarajn indikojn pri la donacinto (minimume nomo kaj lando). La lotumado okazos publike, dum la kongreso, ĉe konvena ceremonio. Donacetoj ankaŭ de nekongresantoj estas danke akceptataj.

La sportaj konkursoj, en kiuj rajtas partopreni ĉiuj aliĝinto, ampleksos precipe disciplinojn de malpeza atletiko, nome: por la junuloj — kurado je 100 kaj 400 m., longa salto, alta salto kaj puŝado de kuglo; por junulinoj — kurado je 60 m., longa salto kaj alta salto. Tutcerte okazos turniro pri tabloteniso kaj eventuale aliaj ludoj, se anoncus sin sufiĉe da kandidatoj. La juruloj el Ruse anoncis kompletan futbolteamon. Kiuj vetludos kontraŭ ili?

La KK petas ĉiujn junajn esperantistojn en la lardo senhezite fari proponojn, doni ideojn pri la diversaj eroj de la kongreso, pri la ornamado kaj amuzaĵaj programoj, por la plej sukcesa aranĝo de la kongreso. Skribu ankaŭ rekte al: VRACA, Enjo Daskalov, Karl Marks 17.

Korespondadreso de la KK: JUNULARA KONGRESO, Sofio, p. k. 587
Konto: № 15/1886 en DSK—Sofia/Bl: goevski rajon.

NOVA STUDENTA SOCIETO EN PLOVDIV

La 18-an de dec. 1962 la plovdivaj gestudentoj-esperantistoj kolektiĝis por pridiskuti la problemon pri fonda de studenta societo en Plovdiv. Interalie oni substrekis, ke fondiĝo de tia societo en Plovdiv — la dua urbo en nia lando, kun kvin altlernejoj, sendube helpas la disvastigon de la lingvo inter la junuloj kaj la organizan unuiĝon de pluraj gestudentoj-esperantistoj, nun ekster la movado.

La saman tagon, kun granda entuziasmo dekses gestudentoj kaj du universitataj profesoroj fondis novan societon kaj donis al ĝi

la nomon „Studenta Impeto“. La celoj de la societo kaj de la novelektita estraro estas disvastigi Esperanton precipe en la studentaj medioj, kontakti kun studentaj societoj kaj junulaj grupoj en la lando kaj fremdlande kaj interŝangi sperton pri la problemoj de la studado kaj ĝenerale pri la studenta vivo.

Baldaŭ oni malfermos du kursojn. La kunvenejo de la studentoj estas la klubejo de societo „Kulturo“, ĉiun mardon kaj vendredon je la 19,00 h.

J. Angelov

KOLAROVGRAD. En la ŝtata maŝinkonstrua uzino laboras pluraj esperantistoj. Kiel turnisto, k. do Trendafil Demirev regule superas la normojn kaj produktas ĉiam bonkvalitajn maŝinolementojn. Ĝuste pro tio lia portreto estas videbla sur la honortabulo ĉe la enirejo de la uzino. Li estas fervora esperantisto kaj konstante verbas por la novaj kursoj, sed li mem ankaŭ devas multe lerni, por forigi nesufiĉan posedon de la lingvo, precipe nun antaŭ la UK en Sofio.

Dum la kuranta jaro ĉe nia societo estis fondita turista sekcio — grava kaj pozitiva iniciato. Sed kial tiu nova sekcio, kial la respondeculino pri ekskursoj — k. d. M. Stanĉeva malviglas?

Laŭ decido de la jarkunveno, la libraro de nia societa biblioteko estis transdonita por konservado kaj pruntedonado al la biblioteko de la kulturdomo „Napredak“. Tio ebligas ankaŭ la neorganizitaj esperantistoj kaj gekursanoj legi la librojn. La propaganda signifo ankaŭ ne estas ignorenda. Tamen, bedaŭrinde ankoraŭ ne sufiĉe oni diskonigis la malfermon de la Esperanto-fako en tiu biblioteko.

Laŭ la rezolucio de la jarkunveno, la membraro devis esti dividita je grupoj laŭ teritoria principo, por plifaciligi la organizan laboron kaj al propagandon. Sed ĝis nun eĉ ne unu grupo estas fondita. Ekzistas nur la uzina sekcio, fondita pasintjare. Tio grave embarasas la agadon de la estraro, sed neniu el ties membroj entreprenas ion. Kion oni raportos al tiu la jarkunveno? Por kuraĝigi la malmultajn studentojn de la lingvo kaj ties aplikado, estis decidite organizi tradukajn konkursojn, sed ankaŭ tiu iniciato estis lasita flanko. Ofte oni povas aŭdi plendojn, ke la klubejo ne estas vizitata. Sed estas dubinde, ĉu iu vizitus ĝin, se ne estas starigitaj kaj taskoj kaj okupoj. La estraro de nia societo devas pli profunde analizi sian laboron.

Ilija Andreev

Vil. Ŝatrovo. Okaze de la naskiĝtago de L. L. Zamenhof, nia societo „Balkana Konkordo“ organizis modestan solenon. Raporton pri la vivo, agado kaj ideoj de Zamenhof tra legis la prezidanto de la societo, k. d. G. Kaŝukev. Junaj kaj maljunaj esperantistoj, pleningintaj la salomon, aŭskultis ankaŭ literaturan kaj muzikan programon.

Ivan Filov

Vil. Panĉarevo. Post la fondo de la societo „Balkana Konkordo“ k. d. N. Nikolov, instruisto kaj sekretario de la societo, organizis kurson ankaŭ en nia vilaĝo Panĉarevo. En daŭro de tri monatoj partoprenis kelkaj entuziasmaj komsomolanoj: S. Ananieva, N. Simeonova, G. Velinova, P. Bojilova kaj aliaj. Post la kurso

ili sukcese prezentigis antaŭ ekzamena komisiono. Konatigante kun la celoj kaj taskoj de Esperanto-movado la novaj esperantistoj decidis fondi societon, kiun oni nomis „Razmetanica“, laŭ la nomo de la regiono. Nun la societo jam vige laboras. Estis kolektitaj pluraj abonoj por Esperanto-gazetoj. Nova kurso por komencantoj, gvidata same de k. d. N. Nikolov, estis organizita. Inter la gekursanoj estas oficistoj, agroteknikistoj, laboristoj k. a. La societo organizis solenan kunvenon okaze de la naskiĝtago de L. L. Zamenhof kaj preparas sian partoprenon en la 48-a UK de Esperanto en Sofio.

Gjurgena Todorova

PLEVEN. La antaŭstaranta 48-a UK de Esperanto en Sofio mobilizas la fortojn de la esperantistoj en nia urbo. Okaze de la kongreso ni plimultigos nian membraron per 20%, malfermos du novajn kursojn en la lernejoj kaj disvolvos vastan kulturklerigan kaj propagandan laboron en la urbo kaj la distrikto.

En 1963 j. nia societo festos sian 60-an datrevenon. En la jaro 1903 estis fondita de la loka esperantisto Kosta Avramov la unua Esperanto-grupo en Plevn. Tiukaze nia societo decidis aranĝi grandan ekspozicion, respektante la evoluon kaj atingojn de la loka societo, de la landa kaj internacia movado.

Pere de la organo de BEA ni petas ĉiujn esperantistojn helpi nin por la efektiviĝo de tiu iniciato. Ni danke akceptas materialojn pri la agado de niaj malnovaj societanoj, leterojn, bildojn, librojn kaj ĉiujn aliajn materialojn aŭ dokumentojn, kiuj povas esti taŭgaj por ekspoziciigo.

Ilija Jaĉev

PLOVDIV. Societo „Kulturo“ regule ellaboras kaj vaste diskonigas siajn trimonatajn laborplanojn. Ni jam komencis plenumi la unuan trimonatan planon de la rova 1963 jaro. Grava arando dum januaro estis la organiza kunveno dediĉita al la lasta plenkunsido de CK de BEA. K. d. Petrov prelegis pri la historia 8-a Kongreso de BAP kaj formulis konkludojn pri nia agado kiel esperantistoj. K. d. Bataklijev informis pri la laboro de la plenkunsido de CK de BEA kaj ĝiaj decidoj.

Oni notis, ke en Plovdiv estas pli ol 400 abonantoj por diversaj Esp.-gazetoj, sed la abonigado por „Bulgara Esperantisto“ postrestas.

Fine la kunveno akceptis rezolucion, kiu entenas konkretaj urgajn taskojn.

Ĥristo Enĉev



Forpasis unu el la grandaj figuroj de la tutmonda Esperanto-movado. La 28-an de aŭgusto 1962 en Rolle, Svislando, mortis **Edmond Privat** en sia 73-jara aĝo. Li naskiĝis en Ĝenevo la 17-an de aŭgusto 1889. Ankoraŭ junulo, li lernis Esperanton. La grandioza ideo pri tutmonda komprenilo kaptis lian koron kaj animon. La kvalitoj de la facila, sed bela lingvo ravis lin. Kaj kun sia tuta idealismo de juna homo li dediĉis sian energion por la prospero de Esperanto kaj laboris senlace kaj sindone ĝis la fino de sia vivo.

Estas esperantistoj, tre fervoraj dum sia juneco, kiuj poste, en sia matura aĝo, progresinte en la vivo, atinginte altan rangon en la socia vivo, preskaŭ forgesas sian amon al Esperanto, perdas la kontakton kun la movado kaj lasas siajn sciojn rustiĝi. Ili ekdronas en novaj intereso kaj ne povas trovi tempon por doni pluan kontribuon al la amita afero.

Edmond Privat ne estis de tiu ĉi kategorio. Alte klera, eminentiĝinta, li ne deŝiris sin de Esperanto.

Bona verkisto kaj poeto, elokventa oratoro, klera homo de la scienco, li lasis neelviŝeblan sulkon en la ĝisnuna disvolviĝo de la Esperanto-movado. La lingvon li majstris. Liajn verkojn oni legas kun ĝuo. En ili oni vidas la tutan belecon kaj forton de Esperanto. Ĉiu lia frazo vidigas menson, en ĉiu lia vorto oni sentas la grandan koron de granda homo.

Jam kiel junulo 14-jara, en 1903, li redaktas kun sia amiko — la neforgesebla Hektoro Hodler — la gazeton „Juna Esperantisto“. En la Unua Universala Esperanto-Kongreso en Bulonjo apud Maro en 1905 la juna apostolo ekbrilas per sia elokventa alparolo. Liaj oratoraj prelegoj en la Universalaj kongresoj — speciale en Barcelono (1909) kaj en Antverpeno (1911) — brilas kiel perloj en nia literaturo.

Ni ne povas ĉi tie citi elĉerpe liajn verkojn. Sufiĉas mencii la titolojn de la versaĵaro „Tra l'silento“, de la dramo „Ĝinevra“, de „Vivo de Zamenhof“, „Historio de Esperanto“ (en du volumoj), „Pri la Esperanta literaturo“, „Esperanto de sentoj en Esperanto“, „Kursa lernolibro“, „Karlo“ ka.

Liaj artikoloj, publikigitaj en la revuo „Esperanto“ (de UEA) dum la periodo post la Unua Mondmilito, malkovras epokon de streĉa, prudente gvidata kaj sukcesplena marŝo de Esperanto. Malfacile estas skizi en mallonga artikolo lian multflankan streĉan agadon en tiu glora periodo, en kiu li donis ĝustan direkton de ĉiuj iniciativoj de la movado. Oni devus eldoni en unu volumo liajn artikolojn de tiu periodo; per ili la nuna generacio Esperantista vidus klare la bildon de la movado de tiu tempo kaj eksentus la grandecon de la saĝa gvidanto Edmond Privat.

Li forpasis, sed lia verko restis. Ĝi estas gvida, kuraĝiga kaj konsola ekzemplo por ĉiuj nuntempaj Esperanto-agantoj. La esperantistaro devas scii kaj ĉiam memori la gloran nomon EDMOND PRIVAT!

Ada

TRA LA GAZETARO

En ĵurnalo „Radio signal“ — organo de la uzino por produktado de ma alttensiaj aparatoj en Sofio (de 7. XII. 1962) — informo de D. Todorov pri fondo de esperantista societo „48-a Univeksala Kongreso“. La societa estraro komencis vigan laboron.

En ĵurnalo „Pärvenec“ — organo de la presejo „Todor Dimitrov“ en Sofio (de 12. XII. 1962) — artikolo de Nikola Mladenov titolita „Kurso por lernado de la internacia lingvo Esperanto“. La lingvon lernas 14 preslaboristoj. En ĵurnalo „Haskovska Tribuna“ — Has-

Kovo (de 18. XII. 1962) — informo de B. Kolev titolita „Oni korespondas kun 36 landoj“ — pri la agado de la esperantista societo „As. Zlatarov“ en Ĥasovo.

En ĵurnalo „**Oteĉestven Front**“ — Sofio (de 13. I. 1963) — artikolo de St. Kănĉev — „Baj Ganju ĉe ni kaj en eksterlando“. La aŭtoro rakontas, ke en 1941 j. aperis la esperanta traduko de „Baj Ganju“ — verko de la fama bulgara verkisto Aleko Konstantinov kies 100-jaran datrevenon de lia naskiĝo oni celebras nun en la tuta lando.

En ĵurnalo „**Septemvri**“ — Stara Zagora (de 17. I. 1963) — artikolo de Ing. Dobri Dobrev titolita „La esperantistoj antaŭ novaj taskoj“ — informo pri la konferenco de la esperantistaj societoj en la departemento de Stara Zagora okazinta en Kazanlâk la 13-an de januaro 1963.

En ĵurnalo „**Trudov poĉem**“ — vil. Polski Trămbes (de 30. XII. 1962) — oni publikis novjaran gratulon al la esperantistoj — batalantoj por paco de Mihail Potikin el Nijneudinsk, regiono de Irkutsk, USSR.

En ĵurnalo „**Dunavska pravda**“, Ruse (de 22. I. 1963) — informo de J. Kalinov pri la nova internacia Esperanto-revuo „Monda Kulturo“, en kies 1-a numero aperis longa artikolo de M. Panĉev pri la bulgaraj filmoj.

ESPERANTO EN LA FRANCAJ LERNEJOJ

Parizo, oktobro (IGS 523). — Laŭ statistiko farita de la komisiito de Franca Esperanto-Uniĝo, s-ro R. Blanc, dum la lerneja jaro 1961—62 en la francaj lernejoj 1. 512 gelernantoj de 66 lernejoj estis instruataj pri la Internacia Lingvo Esperanto per 96 kursoj. Temis, laŭ la statistiko, pri 8 elementaj, 18 mezaj kaj 7 specialaj lernejoj plus 22 liceoj kaj 11 porinstruistaj seminarioj.

NI DANKAS!

Ni dankas al k-do Radoslav Triĉkov el Vraca, kiu alvenis helpi la Esp. movadon en nia urbo. Li prelegis en kelkaj publikaj kunvenoj. Estis projekciita ankaŭ filmo, alportita de k-do Belkolev el Sofio.

Ni dankas al k-do Novakov, prezidanto de la popola legejo, kiu prenis sub sia protekto nian societon. Ni dankas ankaŭ al k-do Petrov, redaktoro de la loka gazeto, en kiu estis publikigitaj artikoloj pri nia movado.

Nun funkcias kelkaj kursoj, aliaj estas malfermotaj kaj ni ĝojas pro la sukcesoj.

V. Jakov
Târgoviște, Benkovski 21

ZIGZAGE TRA LA ESPERANTO-GAZETARO

LA PRAKTIKO, organo de Universala Ligo, numero 11 de novembro 1962 aperigas la impresojn de Guy Marchand, el Parizo, pri la vojaĝo de lia familio en Sovet-Unio. Antaŭ la forveturo li estis malguste informita pri la vojaĝeblecoj tra Sovetio. Spite al la timigaj antaŭdiroj de francaj Turismaj Oficejoj, parencoj kaj amikoj li forveruris kune kun sia edzino kaj du malgrandaj infanoj al Moskvo. Post la vizito en USSR li konstatis ke ĉiuj „bonintencaj“ asertoj estas nudaj falsaĵoj kaj li diras en la fino: „Konklude mi deziras diri, ke Moskvo ne estas malproksime, kaj ke ĉiu federalisto devus konsili al la suspektaj homoj iri tien kaj mem rigardi, sed ne iri kun antaŭjuĝaj ideoj. Tiamaniere oni povas helpi en la forigo de tiu kurteno de reciperoka miskompreno, kiu tiel ofte estas intence subtenata de la gazetaro kaj radio, kaj ankaŭ de la profesiaj pesimistoj.“

Trimil kilometroj sur aŭtovojoj — benzino ĉie akirebla je duono de la franca prezo, bone organizitaj kampadejoj . . . Per tia vojaĝo la turistoj povas per siaj propraj okuloj konvinkiĝi, ke ambaŭflanke de la fera kurteno la homoj havas la saman deziron: Vivi en paco por akiri bonan vivstaton. La turistoj vidos ke la rivalco inter la du kontraŭaj ekonomiaj sistemoj, kiuj dividas la mondon, dum ĉiutage la diferencoj inter ili malpliĝas, neniel valoras tian mondmiliton“.

Can'ko Murg'n

„The international Language Revien“ estas la titolo de internacia gazeto, kiu aperigos arĵtikolojn kaj komentojn pri kaj en artefaritaj lingvoj: Esperanto, Ido, Interlingua kaj Occidental. La adreso de la gazeto estas: Floyd Hardin, P. O. Box 393, Denver 1, Colorado, U. S. A.

BRAZILIO

Paulo Antonio Coelho (16-jara fraŭlo), Av. Cesário de Melo, 868/202, Campo Grande, GB-Rio de Janeiro.

Adail de Souza Rocha (17-jara fraŭlo), Av. Isabel, 166-Sta. Grus, GB, Rio de Janeiro.

Alcebiades Jose Ferreira (38-jara s-ro), Rua Pe. Belisário, 215-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Calissa Rosa Machado (14-jara knabino) Rua 12 Fevereiro, 961-Bangu, GB, Rio de Janeiro.

Arycio Pereira Conceicao (25-jara fraŭlo) Rua Boiobi, 663-Bangu, GB Rio de Janeiro.

USSR

E. Zakaŝanskis, librotenisto, Riga — C. P. O. Box 180. atva SSR, kun la tuta mondo en Esperanto kaj angla lingvoj.

Sofija Konstantinovna, str. Dzerĵinskij 97 log, 40, Harkov 23.

Sergej Vasilev, N. Kuzminki, kvart. 118, korp. 43, kv. 59, Moskva Ĵ — 439.

Anoj de 7-monata Esperanta Ĉeh kurso ĉe la Klubo de intelektularo proponas al la gesamdeanoj el tuta mondo interŝanĝi „parolantajn leterojn“ kun surbendigitaĵ nacilingvaj aŭ esperantaj kantoj, versaĵoj ktp, utilaj por lernado kaj amuzo. Adreso: USSR, Ĥmelnickij, str. Lenin 28, Regiona Biblioteko, Esperanto.

ANGLIO

D-ro George Barasi, 45 Twyford Avenue London 2, ĝenerala medicina praktikanto deziras korespondi kun medicinistoj.

DANLANDO

Knud Weile, Vinkelvej, Vedbaek — dezira s korespondi kun bulgaro pri p. m. kaj tute ordinaraj homaj problemoj (58 jara fraŭlo).

SVEDIO

S-no Erna Tohansson, Östergatan, 43 c 3+r, Skövde — kun bulgaraj ĝesperantistoj.

Ĉefredakto: o: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefo daktoro) Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

La 12-an de novembro 1962 en Sofio mortis Teodoro Kânev en sia 81-jara aĝo. Li estis siatempe — ĉirkaŭ 1902—1905 unu el la plej agemaj kaj kleraj esperantistoj en Bulgario, kunlaboris regule en la tiama gazeto „Rondiranto“, tradukis kun Georgo Atanasov la konatan lernolibron „Esperanto en 10 lecionoj“ de Th. Cart kaj Pagnier, publikigis en bulgara traduko partojn el la Komentario de la Esperantogramatiko de L. de Beaufront. Li estas tradukinto de bulgaraj literaturaĵoj, kelkaj el kiuj aperis en la gazeto „Lingvo Internacia“ (Parizo) En 1910 li estis elektita sekretario de la Bulgara Esperantista Ligo (nun Bulgara Esperantista Asocio) sed transiris al Ĥlo kaj ĉesigis sian laboron por Esperanto. Li provis sensukcese krei Ĥlo movadon en Bulgario. Tamen lia agado por Ĥdo ne malgravigas liajn meritojn al la Bulgara Esperanto-movado, en la paĝoj de kies historio restos neevitebla ankaŭ la nomo de Teodoro Kânev.

NEKROLOGOJ

L. 16-a de decembro 1962 forpasis D-ro Anton Pomakov, supera sci nca kunlaboranto, membro de la medicina sekcio ĉe BEA. Niajn kondolencojn al la funebra familia.

La 22-an de septembro 1962, post longa malsano mortis k-do VASIL KONSTANTINOV GENĈEV, aktiva membro kaj ekstrarano de societo „Radio“ en Pazarĝik.

Naskita en 1891, esperantisto ekde 1918, il estis bona kursgvidanto kaj propagandisto de Esperanto. Niajn sincerajn kondolencojn.

Esperanto-societo „Radio“ Pazarĝik

LA STATUTO DE BEA

Ĵus aperis kun ĉiuj ŝanĝoj kaj aldonoj.

Ĝi estas necesa gvidilo por la organiza laboro de ĉiu societo kaj grupo.

Ĝi devas konstante troviĝi en la poŝo de ĉiu aktivulo, de ĉiu aganto al kiu estas kara la Esperanto-movado.

Ĝi devas esti lernata, sciata kaj ap'ikata de ĉiu membro de nia asocio.

Tuj mendu ĝin ĉe la kancelario de la asocio, p. k. 66, Sofio!

La societoj faru kolektivajn mendojn por siaj membroj!

Prezo 10 st.

Mendu membro-kartojn por viaj novaj membroj! Nomaroj ne estas sendendaj. *Prezo 10 st.*

Поради изчерпване на определения брой
канцеларията на **Българския есперантски съюз**
не приема повече суми за:

1. абонаменти на „**ХЕРОЛДО**“
2. членство към **УЕА** с или без
абонамент на „**ЕСПЕРАНТО**“

Изпратени суми ще се държат на разположение
на подателите.

Съюзът разполага с пропагандната книжка
на български език

„СВЕТЪТ ИМА МЕЖДУНАРОДЕН ЕЗИК“

Цена 0,50 лв.

„ПОД ИГОТО“ от Ив. Вазов на есперанто

цена 1,73 лв.

Суми изпращайте до п. к. 66 — София. Поръчки
без суми или с наложен платеж не се изпълняват.